

KIU ĜIN TROVAS, VENDAS ĜOJE ĈIUJN POSEDAĴOJN, KAJ AĈETAS ĜIN

Komento al la evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 13, 44-52

En tiu tempo Jesuo rakontis al homamaso jenan parabolon:

„La regno de la ĉielo similas al trezoro kaŝita en kampo. Iu ĝin trovas, kaŝas ĝin denove, poste vendas ĝoje ĉiujn siajn posedaĵojn, kaj aĉetas tiun kampon.

La regno de la ĉielo similas ankaŭ al komercisto serĉanta multekostajn gemojn. Trovinte unu multvaloran perlon, li vendas ĉion, kion li posedas, kaj aĉetas ĝin.

Plue, la regno de la ĉielo similas al reto, kiu estis ĵetata en la maron, kaj kolektis ĉiuspecajn fiŝojn. Kiam ĝi estas plena, la fiŝistoj suprentiras ĝin al la marbordo, kaj sidante apartigas la bonajn en korbojn, dum ili forĵetas la malbonajn. Tiel estos en la fino de la mondo. Venos la anĝeloj kaj apartigos la malbonulojn for de la justuloj, por ĵeti la unuajn en fornon de fajro. Tie estos plorado kaj grincado de dentoj.”

Poste Jesuo diris al la disĉiploj: „Ĉu vi komprenis ĉion?” „Jes” ili respondis. Kaj Li diris: „Tial se iu skribdoktoro fariĝas disĉiplo de la ĉiela regno, li fariĝas kiel domomastro, kiu eltiras el sia trezorejo objektojn novajn kaj malnovajn.”

En la 13-a ĉapitro de la evangelio de Mateo, Jesuo per tri paraboloj, atentigis la komunumon kontraŭ tri riskoj: per la parabolo de lolo (malbona herbo) li igis singarda la komunumon kontraŭ la tento esti komunumo el elektitoj; per la parabolo de sinapo, kontraŭ la tento je grandeco; kaj, fine, per la parabolo de la fermentaĵo, kontraŭ senkuraĝiĝo. Nun, kiel kontraŭveneno al tiuj tri tentoj, Jesuo invitas al fideleco al la unua beatproklamo, kaj tion li faras denove per paraboloj.

Ni legu la 13-an ĉapitron, versiklon 44, de Mateo: *"La regno de la ĉielo"*, mi memorigas, ke la regno de la ĉielo ne estu komprenata kiel regno en la transmondo, regno en la ĉielo, sed kiel regno de Dio, nome la alternativa socio, kiun Jesuo venis realigi sur ĉi tiu tero, *"similas al trezoro"*, la termino trezoro malfermas kaj fermas ĉi tiun pecon, kiu do estas sub la signo de beleco, de brilego, *"kaŝita en kampo. Iu ĝin trovas,"*, ĉi tiu ulo ne serĉis la trezoron, li ĝin trovis, temis pri okazo kiun li scipovis kapti tuj en sia vivo kaj, sehezite, skribas la evangeliisto *"kaŝas ĝin denove, poste vendas ĝoje ĉiujn siajn posedaĵojn,"*, li ne pentas, *"kaj aĉetas tiun kampon."* Sankta Paŭlo, en la letero al la Filipianoj, skribas: "Kio estis al mi gajno, tion mi rigardis kiel malgajnon pro Kristo. Pro Li mi rigardas ĉion kiel rubon". Kiam oni renkontas Jesuon kaj lian mesaĝon, ĉi tiu estas la respondo al tiu deziro de vivpleneco, kiun ĉiu homo enhavas en si mem, kaj ĉio cetera perdas valoron.

Daŭrigas Jesuo, ke *"La regno de la ĉielo similas ankaŭ al komercisto serĉanta multekostajn gemojn"*, dum la unua homo ĝin trovis hazarde, scipovis kapti tuj la okazon, la ŝancon de sia vivo, la dua kontraŭe serĉadas tiun okazon, *"Trovinte unu multvaloran perlon, li vendas ĉion, kion li posedas, kaj aĉetas ĝin."* La evangeliisto volas diri, ke la sekvado de Jesuo ne postulas neimageblajn forferojn - la termino "ofero" aperas nur dufoje kaj en malpozitiva senco en ĉi tiu evangelio - sed ĝi havigas ĝojon, kaj la termino "ĝojo" aperas sesfoje en la evangelio de Mateo.

Sed daŭrigas Jesuo: *"Plue, la regno de la ĉielo similas al reto, kiu estis ĵetata en la maron,"*, Jesuo invitis sian disĉiplojn esti fiŝkaptistoj de homoj, kaj nun li diras kiel ili devas fiŝkapti, *"kaj kolektis ĉiuspecajn fiŝojn."*, verdire en la teksto ne estas la vorto "fiŝoj", ĝi estas aldono de la tradukinto, do ĉiaspecaj aĵoj estas kolektitaj. La propono de Dio, la propono de lia amo, estas por la tuta homaro, apartenas al la homoj, ĉu respondi, ĉu ne respondi, *"Kiam ĝi estas plena, la fiŝistoj suprentiras ĝin al la marbordo, kaj sidante apartigas la bonajn en korbojn, dum ili forĵetas"*, kaj ĉi tie la tradukoj diras bedaŭrinde *"la malbonajn."*, kio montrus moralan juĝon fare de la fiŝkaptisto. Ne, ne estas tiel, *"ili forĵetas la putrajn"*, la termino utiligita de la evangeliisto estas "putra", ĝi ne estas juĝo, bonaj kaj malbonaj, ĝi estas konstato: tiuj kiuj povas alporti vivon kaj tiuj kiuj estas putraj. Tiuj kiuj elektas la vivon estas vivoplenaj, tiuj kiuj elektas la morton estas mortoplenaj, do senutilaj.

Kaj fakte daŭrigas Jesuo: *"Tiel estos en la fino"* tamen ne *"de la mondo"*, sed *"de la tempoj"*, *"Venos la anĝeloj kaj apartigos la malbonulojn"*, laŭvorte la maliculojn, la dissemantojn de malkonkordo, la infanojn de la diablo, *"for de la justuloj,"*, ne de la bonuloj, sed de la *"justuloj"*, tio estas la fideluloj al la mesaĝo de Jesuo, *"por ĵeti la unuajn en fornon de fajro."* Ĉi tiu estas citaĵo el profeto Danielo, ĉapitro 3 versiklo 6, kie la forno de fajro estis la puno por tiuj kiuj ne adoris la povon esprimitan de la statuo de Nebukadnecar. Nu, laŭ Jesuo kontraŭe la forno de fajro - nome, la kompleta detruo - estas la fino de tiuj kiuj adoras la povon. Do tiuj kiuj elektas la amon, la kundividon, la sindonemon, la pardonon - jen kio estas la regno de la ĉielo, ĝi estas la regno de Dio kiun Jesuo venis inaŭguri - estas plenaj de vivo kaj ĝin komunikas; tiuj kiuj kontraŭe elektas la egoismon, la avidon, la povon, estas plenaj de morto.

Tiam ne estas juĝo fare de Dio, sed simple konstato inter tiuj kiuj estas vivoplenaj kaj tiuj kiuj kontraŭe estas jam en la putrado de la morto; "*Tie estos plorado kaj grincado de dentoj*", biblia bildo kiu indikas la kompletan malsukceson en la vivo.

Ĉe la fino de la sep paraboloj pri la regno, Jesuo diras: „*Ĉu vi komprenis ĉion?*” „*Jes*” ili respondis. Kaj Li diris: „*Tial se iu skribdoktoro*”, la skribdoktoro estis grava persono, li estis la majstro de Israelo en eminenta senco, li konsistigis la seneraran instruoficon, “*fariĝas disĉiplo*”: ankaŭ la majstro, fronte al la novaĵo de Jesuo, devas refariĝi lernanto, devas fariĝi disĉiplo, eble tio estas iamaniere la portreto de la evangeliisto “*de la ĉiela regno, li fariĝas kiel domomastro, kiu eltiras el sia trezorejo*”, jen la termino trezoro kiu malfermis la pecon kaj ĝin fermas, “*objektojn novajn*”, laŭlitere plibonajn, la evangeliisto utiligas la saman terminon kiu, en la evangelio de Johano, indikos la novan ordonon, la plibonan ordonon, “*kaj malnovajn*”, kion intencas diri la evangeliisto? Ke la mesaĝo de Jesuo havas ĉiam prioritaton kompare kun tiu de Moseo: la nova interligo estas pli grava ol la lasta interligo de la malnova testamento.